

# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 2003

ISSN 1163.0442

*\*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem\**

74-a jaro, n-ro 1 (1171)

MENSUEL/MONATA

<http://www.sat-esperanto.org/> \*\*\* retadreso: [satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)

## MICHEL DUC GONINAZ esperantisto de la jaro 2002

paĝo 3



Nia laŭreato dum la lasta vizito al la sidejo de SAT  
de maldekstre: gek-doj Schram, de Weerd, Duc Goninaz kaj Bannier

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...

Karaj gekamaradoj, ni eniris en la novan jaron kun espero ke ĝi estos pli bona ol la lasta. Ĝi komenciĝas per la proklamo de la esperantisto de la jaro, kaj temas pri nia k-do Michel Duc Goninaz. Gratulon al li kaj al ĉiuj kiuj kontribuis al la apero de la Nova PIV.



En tiu ĉi numero vi trovos sufiĉe multajn informojn pri nia kongreso en Ĉaŭdefono. Aliĝu tuj ! Ne atendu la lastan momenton. Ankaŭ vi trovos informojn pri la antaŭkongreso en Grindelvaldo.

Espereble kelkaj aliaj artikoloj ankaŭ interesos vin kaj provokos debaton.

Via redaktoro daŭre ripetas siajn invitojn al kunlaboro. Sendu viajn informojn per reto aŭ per normala poŝto al la adreso de la SAT-sidejo, ĉar ni bezonas materialon por la venontaj numeroj de Sennaciulo.

Atendante vian kunlaboron, kamaradece salutas vin, via

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

\*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 55€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

## S.A.T. EN BRITIO 16-18 Majo 2003 Ĉe la NOVA Brita E-Centro\*

Pasigu ĝindan stimulan semajnfino inter la laboristaro en bela kampara domo. Gary Mickle (el Germanio) parolos pri naciismo kaj novdekstrismo; krome estos politika forumo, diskuttrondoj, lingvokliniko, distra vespero kaj bona manĝo. Prezo : proks. 65 £ aŭ 100 €.

Por pliaj informoj kaj programo, bonvolu turni vin al:

Derek Tatton (li scipovas Esperanton)

Wedgwood Memorial College

Barlaston

Stoke on Trent

Staffordshire, ST12 9DG

Tel. 44-1782-372105

rete: Weedgwood.college@staffordshire.gov.uk

\*La loko estas atingebla trajne el Londono (2h30). Pli proksimaj flughavenoj troviĝas ĉe Manchester, Liverpool, Birmingham kaj East Midlands.

El ĉiu LEA ni estas pretaj gastigi unu homon senpage. Por pliaj informoj **nur pri tio**, kontaktu :

Arturo Prent

7 Walton Gardens

Hutton, Brentwood,

Essex CM13 1EJ

Tel. 01277-228962, rete: arturo@signalprent.demon.co.uk



*Nova PIV aperis !*

*Akiru ĝin ĉe SAT.*

*Prezo: 70 € + afranko*

*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*

*ekster Eŭropo : 10,06 €*

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

## MICHEL DUC GONINAZ esperantisto de la jaro 2002



*Dum la lastjara Festo de la gazeto l'Humanité estis organizita prezentado de la Nova P.I.V. kun diskuto.*

*De maldekstre : Vincento Charlot, Michel Duc Goninaz kaj s-ro Claude Longue-Épée*

KALININGRAD (Ruslando). Franca profesoro Michel DUC GONINAZ estas proklamita «la Esperantisto de la Jaro 2002». La internacia ĵurio elektis lin pro la eldono de la Nova Plena Ilustrita Vortaro, kies reviziadon li gvidis dum pluraj jaroj. La voĉdonado pri la Esperantisto de la Jaro okazas ĉiujare ekde 1998 laŭ iniciato de «La Ondo de Esperanto». Pliajn informojn pri la projekto legu en la retejo de «La Ondo» <http://Esperanto.Org/Ondo> -- rubriko «La Esperantisto de la Jaro». [Informas: Halina Gorecka, sekretario]

El «HEROLDO KOMUNIKAS»

La internacia revuo "La Ondo de Esperanto" (Kaliningrad, Ruslando) iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Ĉi-jare la kandidatigantoj proponis 18 personojn, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn. La voĉdonado finiĝis je la Zamenhofa Tago, la 15an de decembro, kun jena rezulto: **Michel DUC GONINAZ estas proklamita «la Esperantisto de la Jaro 2002».**

La internacia ĵurio elektis lin pro la eldono de la Nova Plena Ilustrita Vortaro, kies reviziadon li gvidis dum pluraj jaroj.

Iama profesoro pri slavistiko kaj esperantologio en la universitato de Aix-en-Provence (Francio), Michel Duc Goninaz havas longan esperantistan vivon. Aktiva same kiel Gaston Waringhien en la SAT-medio, li transprenis leksikografie lian gravegan moralan kaj scienca heredaĵon. Didaktike kompetenta, li aŭtoris interalie tre utilan vortaron, eldonitan de komerca entrepreno, kun terminoj grupigitaj laŭ semantikaj familioj. Literature fajna, li interalie tradukis la verkon de Albert Camus "La fremdulo". La eta kuriozaĵo: estas li la juna policisto kiu tajpas la konfeson donitan de la edzino de Karleto (Jana Flego) al la komisaro (Raymond Schwartz) en la filmo "Angoroj" de J.-L- Mahé (1963).

**Kamarado Duc Goninaz deklaras ke tiun honorigon li deziras dividi kun KLAŬDO ROUX, kun ĉiuj aliaj kunlaborantoj kaj kun SAT kiu realigis la eldonon.**

La Plenum-Komitato de SAT sincere kaj kun plezuro gratulas al nia kamarado pro tiu meritata distingo kaj dankas al li pro la farita laboro. Ni samtempe dankas al k-do Klaŭdo Roux kiu faris praktike same ampleksan laboron kiel Michel, al Serge Sire pro la desegnoj kaj al ĉiuj kunlaborantoj kaj subtenantoj sen kiuj tiu verko ne povus realiĝi.

K.B.